

AVE MARIA, REĜINO de la ESPERO

muziko kaj vortoj: Emanuele Rovere (Manŭel).

Ave, ave Maria, Reĝino de la Espero,
Vin mi salutas, ho Madono de mia koro.

Vi, de l' mondo Reĝino, de l' vera Amo la fonto,
Patrino de Jesuo, nia Savanto:
asistu nin ĉiutage, kvazaŭ infanojn, prenu niajn manojn,
kaj helpu nin elteni niajn penojn.

Al Vi sopiras koroj, por la konsolo sia,
Vin vokas ĉiuj " Panjo ", kun sento pia.
Protektu Viajn filojn disajn sur la tuta ter',
ne lasu ilin en malsato aŭ sen liber', mi preĝas.

Se l'estonto malheliĝas, brilas pli Viaj okuloj
kaj lumigas nian vojon per radio,
sub gvidado Via sekura ni fariĝas kuraĝuloj,
dank' al helpo Via timigas nin nenio.

Vortojn miajn, do aŭskultu, Vin mi preĝas kun fervoro,
Dipatrino estas Vi nia espero,
estas Vi nia certeco, ke en ĉi mondo triumfos la Bono;
propetu Dion pri paco kaj frateco,
por ni pri Lia pardono.

Ave, ave Maria, Reĝino de la Espero,
Vin mi omaĝas, ho Madono de mia koro. (Al vi omaĝas mi, Madono de mia koro).

Tutkore Vi kompatas pekulon pentofarintan,
neniam Vi forlasas filon vojerarintan.
Fortigu l' malsanulojn, portu al ili resanigon,
aŭ donu almenaŭ sanktan rezignacion, mi preĝas.

Se danĝero proksimiĝas, tenu min flanke de Vi:
ĉiam zorgas Vi pri filo vin vokanta.
Via ĉeno rozaria estas la ankro por mi,
subtenil' por ĉiu filo Vin amanta.

Nun mi petas, Dipatrino, per tiu ĉi simpla preĝado:
montru celon al nia surtera paŝado.
Vi tion faros sendube, ni sopiras al nura provizo:
pretigu por Via filoj, de Vi apude, lokon en Paradizo.

Ave, ave Maria, Reĝino de la Espero,
Vin mi salutas, ho Madono de mia koro.